

Reordigis: *Romano Bolognesi*

Statuto kaj regularoj de IFEF

I F E F

(Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

STATUTO

kaj regularoj

Majo 2004

Tiuj ĉi tekstoj enhavas ankaŭ la ŝanĝojn, kiuj estis aprobitaj de la plenkunsidoj dum la:
- 43a IFK en Olomouc (CS) la 14.05.1991,
- 45a IFK en Cervia (IT) la 09.06.1993,
- 46a IFK en Krems a.d. Donau (AT) la 17.05.1994,
- 49a IFK en Košice (SK) la 14.05.1997.

M

Membroj
asociaj 6-9, 11, 15, 18, 25, 25, 26
individuaj 7, 8, 15, 25, 26
sekciaj 8

O

Organo (de IFEF) 5, 6, 8, 12-14, 16, 24, 26, 28

P

Prezidanto (de IFEF) 8, 12, 13, 20, 26
Proponoj
honorigotoj 7
komitatano "A" de UEA 4
kongresaj 8, 10-13, 15, 16
membroj de Honora Patrona Komitato 8
revizoroj 17

R

Redaktoro
IFEF 12, 14, 26, 28
TeKu 21-25, 25

S

Sekcio
fake aplika 22-25, 26, 29
landa 6, 8, 11, 27
terminara 22, 23, 25, 26, 28
Sekretario
fake aplika sekcio 21-25
IFEF 6, 9, 11-14, 17, 20, 24, 25, 26
terminara sekcio 21-23, 25, 25

T

Terminara Kuriero (TeKu) 22, 23

V

Vicprezidanto (de IFEF) 12, 13, 20, 26

*****

ENHAVO

paĝo

I. ĜENERALAĴOJ
§ 1 Nomo 5
§ 2 Celoj 5
§ 3 Neŭtraleco 5
§ 4 Eksteraj rilatoj 6
§ 5 Agadperiodoj 7
§ 6 Lingvo 7
§ 7 Respondeco de la Federacio 7

II. MEMBRECO
§ 8 Membrokategorioj 7
§ 9 Apogantoj 8
§ 10 Aliĝkondiĉoj 8
§ 11 Eksiĝo kaj eksigo 9

III. KOMITATO
§ 12 Konsisto kaj elektoj 9
§ 13 Taskoj de la komitato 10
§ 14 Taskoj de la ĉefkomitatano 10
§ 15 Anstataŭado 11
§ 16 Respondeco de la komitatanoj 11

IV. ESTRARO
§ 17 Konsisto 12
§ 18 Elektoj 12
§ 19 Taskoj de la estraro 12
§ 20 Funkcioj de la estraranoj 13

V. LABORMANIERO
§ 21 Kunsidoj 14
§ 22 Rajtoj de la membraro 15
§ 23 Voĉdonado 15
§ 24 Kompensoj 16

VI. FINANCOJ, ORGANO, ARKIVO
§ 25 Financoj 16
§ 26 Federacia organo 16
§ 27 Arkivo 17

VII. DIVERSAĴOJ
§ 28 Revizio 17
§ 29 Konfliktoj 17
§ 30 Likvido 17
§ 31 Duboj kaj demandoj 17
§ 32 Aprobo kaj valido 18

VIII. Aldono KR (KONGRESA REGULARO)
A. Ĝeneralaĵoj 19
B. Organizado 19
C. Kongresanoj 20
D. Oficiala programo 20
E. Financoj 20

IX. Aldono FR (REGULARO FAKA KOMISIONO)
A. Ĝeneralaĵoj 22
B. Taskoj 22
C. Konsisto 22
D. Elektoj 23
E. Labormetodo 23
F. Fakprelegoj ekster federaciaj kongresoj 24
G. Demisioj 24

X. Aldono TL (TABELO PRI LIMDATOJ) 25

XI. Aldono OG (ORGANIGRAMO) 26

XII. Aldono LP (LABORPLANO) 27

XIII. Aldono IL (INDEKSO LAŬTEMA) 29

*****

XIII. Aldono IL (INDEKSO LAŬTEMA)

A

Anstataŭanto da ĉefkomitatano 9-11, 25, 26

B

Bilanco
de IFEF 13
kongresa 19, 21
Budĝeto
de IFEF 10, 13, 16
kongresa 21, 25

Ĉ

Ĉefkomitatano 9-17, 21, 23-26

D

Deklaro (pri preteco) 6, 11, 22, 25
Demisio 10, 11, 24, 25

E

Elekto
ĉefkomitatano kaj anstataŭanto 9, 10, 25
estraranoj 11, 25
gvidanto, sekretarioj kaj redaktoro de FK 23, 25
komitatano "A" (da UEA) 4
kongreslando 19
kromkomitatano 9, 10, 25
revizoroj 17, 25, 25
Estraro 6-8, 10-17, 19-21, 25-26, 29

F

Fakprelego 16, 19, 20, 22-25, 29

G

Gvidanto de Faka Komisiono 9-11, 21-23, 25-25

H

Honora Patrona Komitato 7, 8, 10, 21
Honoraj membroj 7, 10, 14, 21, 26
Honoraj prezidantoj 7, 10, 14, 21, 26

J

Jaro
kalendara 7
organiza 7

K

Kandidato
ĉefkomitatano 10
estraro 10, 11, 25
honora membro 7
Honora Patrona Komitatano 8
honora prezidanto 8
komitatano "A" de UEA 6
Kasisto (de IFEF) 8, 11, 13, 21, 25, 26
Komisiono
estrarelekto 11
faka 5, 9-11, 14, 20-23, 25-26, 28, 29
konflikta 17
likvidanta 17
Komitatano "A" (de UEA) 6, 16, 24, 26, 29
Komitatanoj 8-10, 14-17, 24, 25, 26
Komitato 6-21, 23, 25, 25-27, 29
Kongreso
IFEF 5-8, 10-17, 19-21, 23-25, 27
UEA 6, 16, 24, 29
Kotizo
baza kongres- 20, 25
fikso 8, 10
pago 8, 9, 25
Kromkomitatanoj 9-11, 14, 25, 26

L

Landaj asocioj 6-15, 17, 19, 22-25, 26-28
Loka Kongresa Komitato (LKK) 19-21, 23, 24, 25, 25

20.5. instigi la utiligon de la "Korespon-
da Servo" de IFEF,
20.6. trovi novajn adeptojn kaj subte-
nantojn,
20.7. prizorgi la adoptitojn,
20.8. fondi novajn grupojn,
20.9. instigi la membraron por aktive
partopreni Internaciajn Fervojist-
ajn Kongresojn kaj aliajn Esperan-
to-aranĝojn,
21. Junulara agado:
21.1. kunlaborigi junulojn kun la landa
estraro,
21.2. organizi allogajn junularajn aranĝ-
ojn,
21.3. aliĝi al la "Pasporta Servo" de TE-
JO,
21.4. interrilati kun neesperantistaj junu-
laraj organizoj.
22. Organizi lingvokursojn por komencantoj,
progresantoj eĉ fakaj.
23. Funkciigi Esperanto-Klubojn kun nivelaj
kaj kontinuaj programoj.
24. Eldoni landan organon aŭ/kaj informilon.
25. Faka laboro:
25.1. intensigi la terminaran agadon sur
nacia nivelo en kunlaboro kun la
Faka Komisiono kaj kun la fakuloj
de la nacia fervojo,
25.2. eldoni Fervojan Terminaron de I-
FEF en nacia lingvo-Esperanto laŭ
ĝenerala Leksikono de DIC,
25.3. aperigi la klarigan tekston de ofi-
ciala fervoja horaro en Esperanto.

III. Taskoj de komisionoj kaj komisiitoj

26. Terminara Sekcio de Faka Komisiono:
26.1. lntensigi, koordigi kaj raciigi la
terminaran laboron sur internacia
nivelo,
26.2. intensigi la terminaran laboron sur
nacia nivelo,
26.3. eldoni laŭbezone internacian ko-
munikilon (Terminaran Kurieron -
TeKu),
26.4. traduki kaj eldoni novajn termi-
nojn laŭ UIC,
26.5. traduki kaj eldoni la difinvortaron
de UIC,
26.6. bontenadi kaj kompletigi la fervojfa-
kajn esprimojn en PIV,
26.7. traduki intemaciajn regularojn,
26.8. recenzi tekstojn de fervojfaka en-
havo.
27. Faka Aplika Sekcio de Faka Komisiono:
27.1. zorgi por lingve senriproĉaj fa-
kprelegoj,
27.2. verki, aperigi fakajn artikolojn, re-
spektive prezenti fakprelegojn,
27.3. eldoni "Faka Kajero"-jn pri gravaj
fakaj artikoloj, prelegoj,
27.4. aranĝi "Faka Tago"-n (t.n. Kontak-
tkunvenon) kun fakprelego(j), kaj
fakan ekskurson dum Universalaj
Kongresoj,
27.5. intensigi je tradukado de fakprele-
goj en naciajn lingvojn,
27.6. sugesti koncizajn klerigajn infor-
mojn pri fervojaj aktualaĵoj ĉiu-
landaj.
28. Ĉefkomitatano de IFEF:
28.1. organizi kaj direkti la laboron de I-
FEF-Komitato,
28.2. eldoni cirkulerojn kaj demandilojn
(kune kun la vicprezidanto) al la
landaj asocioj de IFEF,
28.3. kolekti kaj publikigi la kongreso-
proponojn,
28.4. kunmeti kaj eldoni la adresaron de
IFEF kaj landaj asocioj de IFEF.
29. Komitatano A de UEA:
29.1. reprezenti IFEF en Universalaj
Kongresoj,
29.2. gvidi la kontakt-kunvenon dum U-
niversalaj Kongresoj,
29.3. flue observi la efektivigon de la
strategia laborplano de UEA,
29.4. specialaj taskoj laŭ komisio flanke
de estraro kaj komitato,
29.5. raporti skribe kaj buŝe pri sia aga-
do al estraro kaj komitato.

*****

I ĜENERALAĴOJ

§ 1 Nomo

1) La nomo de la faka fervojista Esperanto-organizo estas Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. (IFEF). En tiu ĉi Statuto ĝi estas nomita "Federacio" aŭ "IFEF".

[IFEF estis refondita la 4an de aŭgusto 1948 en Amsterdam (NL) sub la nomo "Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj", valida ĝis 1953, poste Internacia Federacio Esperantista Fervojista", valida ĝis 1963. La unua fondiĝo de internacia fervojista Esperanto-organizo okazis la 7an de septembro 1909 en Barcelona (ES), sub la nomo "Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervojistoj" (IAEF).]

§ 2 Celoj

La celoj de la Federacio estas:

a) disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto inter fervojistoj, ĉe fervojistaj organizoj kaj fervojaj instancoj;
b) kontaktigi aktivajn kaj emeritajn fervojistojn, kiuj scipovas aŭ lernas Esperanton;
c) aranĝi internaciajn renkontiĝojn;
d) eldoni oficialan organon, fakan materialon kaj terminaron;
e) evoluigi la fervojfakan lingvon, gardi ĝian unuecon kaj zorgi pri ĝia ĝusta uzado;
f) kontribui al faka klerigo kaj ĝenerala kulturo de la membroj.

Ĝenerala Regularo § 2:

Por la aranĝo de kongresoj, por terminaraj kaj fake aplikaj aferoj, kaj por limdatoj respektive validas:

ALDONO KR (kongresa regularo),
ALDONO FR (regularo por la faka komisiono),
ALDONO TL (tabelo pri limdatoj).

[Regularon pri Junulara Sekcio oni starigos, kiam denove eblos funkciigi tiun sekcion, kiu ne plu kapablis agadi ekde 1977].

Al b) Por plifaciligi reciprokajn kontaktojn, la Federacio starigas Korespondan Servon.

§ 3 Neŭtraleco

1) La Federacio estas faka kultura organizo, neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko kaj sociaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj.

2) Respekto de la homaj rajtoj, difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, estas esenca elemento de la federacia agado.

§ 4 Eksteraj rilatoj

1) IFEF estas "Aliĝinta faka asocio" de la "Universala Esperanto-Asocio" (UEA).
2) IFEF kunlaboras kun la "Internacia Fervojista Federacio por Kulturo kaj Libertempo" [Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots (FISAIC)].
3) IFEF laŭ konveneco kunlaboras kun aliaj Esperanto-organizoj aŭ subtenas ilin.

Ĝenerala Regularo § 4:

Al 1) a) Laŭ UEA-statuto IFEF rajtas delegi komitatanon "A" al la UEA-komitato. La kondiĉojn kaj limdatojn pri tio UEA diskonigas sufice frue antaŭ la elektoj. Krome, laŭeble, limdato por la proponoj estu diskonigata per la federacia organo kaj per cirkulero.

b) La membroj nomitaj en § 22 rajtas fari proponojn al la IFEF-sekretario. Ili devas atingi lin plej malfrue unu monaton antaŭ la limdato de la elektoproceduro. Se alvenas pluraj proponoj, la estraro decidas pri la elektota kandidato kaj anoncas la elektiton al UEA. Antaŭe la proponita kandidato skribe devas deklari, ke li akceptas la kandidatecon kaj estas preta partopreni en la Universalaj Kongresoj (UK).

c) La taskoj de komitatano "A" estas:
   1) reprezenti IFEF ĉe UEA;
   2) kunlabori kun la UEA-komitato;
   3) okazigi kontaktkunvenon por fervojistoj en Universalaj Kongresoj;
   4) raporti pri sia agado al IFEF kaj fari proponojn por plifirmigi la reciprokajn rilatojn.

Al 2) a) La landaj IFEF-asocioj laŭeble estu membroj de FISAIC pere de ties landaj sekcioj.

b) IFEF-kongresoj kaj aliaj gravaj internaciaj manifestacioj estas envicigataj en la aranĝo-kalendaron de FISAIC, konforme al ties statuto.

c) Post ĉiu IFEF-kongreso la sekretario informu FISAIC pri la planota(j) kongreso(j).

d) Interkonsente kun FISAIC la Federacio rajtas honori membrojn per FISAIC-medaloj. Honoroto devas havi eksterordinarajn kulturajn meritojn en fervojista medio, ĉefe sur internacia kampo, kaj devas esti membro de FISAIC-sekcio.

e) Principe la komitato elektas la honorotajn membrojn, sed ĝi povas delegi tiun rajton al la estraro por la daŭro de tri jaroj. Tiakaze la estraro elektas la honorotan personon konsente kun la respektiva landa asocio kaj laŭ la kondiĉoj interkonsentitaj kun FISAIC.

f) Kutime la medaloj estas transdonataj al la honorotaj personoj flanke de FISAIC mem. Tio okazu laŭeble en IFEF-kongreso.

XII. Aldono LP (LABORPLANO) [2002 – 2010]

I. Taskoj de IFEF

1. Plenumi la decidojn de la Komitato.
2. Doni konsilojn al la landaj asocioj de IFEF.
3. Interrilati kun instancoj kaj aŭtoritatoj:
   3.1. fervojaj instancoj kaj aŭtoritatoj,
   3.2. UIC,
   3.3. FISAIC (kun landaj sekcioj nur interkonsente kun landa IFEF-asocio),
   3.4. aliaj fervojistaj organizoj, (kulturaj, artaj, libertempaj, sportaj, filatelaj) interkonsente kun la landaj asocioj de IFEF,
   3.5. nefervojistaj instancoj kaj organizoj interkonsente kun landa IFEF-asocio.
4. Interrilati kun Esperanto-organizoj:
   4.1. UEA,
   4.2. SAT,
   4.3. UMEA,
   4.4. aliaj Esperanto-organizoj.
5. Kolekti kaj disponigi informojn:
   5.1. kolekti gravajn informojn kaj aĵojn,
   5.2. disponigi informojn al interesuloj,
   5.3. utiligi la IFEF-kongresojn kaj ĉiun taŭgan okazon por informi la publikon,
   5.4. Informi la landajn asociojn de IFEF pri la estrarkunsidoj de IFEF.
6. Regule aperigi ĉiujare 6 numerojn de la IFEF-organo - Internacia Fervojisto.
7. Instigi landajn asociojn organizi IFEF-Kongresojn kaj skisemajnon.
8. Instigi ĉiuspecan kulturan agadon de la landaj asocioj.
9. Instigi kaj subteni la agadon de junularo.
10. Iniciati kaj helpi en la organizo de novaj landaj asocioj.
11. Ĝenerale favorigi varbadon ĉiuspecan:
    11.1. intensigi la varbadon de novaj membroj - ĉefe junulojn,
    11.2. varbi izolitajn membrojn, varbi esperantistojn el la aliaj branĉoj de la trafiko, kaj malfermi la "IFEF-pordon" por ili,
    11.3. varbi adoptitojn kaj rekomendi ilin al la koncema landa asocio.
12. Progresigi kaj subteni la terminaran laboron kunlabore kun UIC.
13. Progresigi kaj subteni la fakan laboron (per fakaj artikoloj, fakprelegoj, fakaj kajeroj).
14. Kolekti kaj okaze publikigi statistikojn kaj historiajn datojn.

II. Taskoj de la landaj asocioj kaj ties lokaj societoj

15. Interrilati kun instancoj kaj aŭtoritatoj:
    15.1. fervojaj instancoj,
    15.2. fervojistaj sindikatoj,
    15.3. landaj FISAIC-asocioj,
    15.4. aliaj fervojistaj organizoj (kulturaj, artaj, sportaj),
    15.5. nefervojistaj organizoj.
16. Organizi jarkunvenojn.
17. Organizi komunajn aranĝojn kun aliaj asocioj.
18. Interrilati kun Esperanto-organizoj:
    18.1. landaj asocioj de UEA,
    18.2. landaj grupoj de SAT,
    18.3. aliaj.
19. Informado en la plej vasta senco:
    19.1. kolekti gravajn informojn kaj sendi ilin al IFEF,
    19.2. nomumi respondecu1on, kiu provizas la redaktoron de la IFEF - organo per aktualaj novaĵoj,
    19.3. informi la vastan publikon,
    19.4. informi fervojajn administraciojn kaj fervojajn sindikatojn,
    19.5. informi en propra medio (deĵorejo k.s.),
    19.6. informi aliajn telekomunikajn branĉojn (navigacian, aertrafikan, ŝosean, urbotrafikan, poŝtistan, radio - televid- kaj telefonaferajn institucionjn),
    19.7. aranĝi ekspoziciojn,
    19.8. kromaj aktivecoj (flugfolioj, afiŝoj, sonbendoj, diskoj, murgazetoj, montrofenestroj).
20. Varbado:
    20.1. Plialtigi la membronombron krom fervojistoj kun parencfakuloj,
    20.2. aranĝi lingvokursojn eĉ konsidere la fakan lingvon,
    20.3. zorgi pri instruado en faklernejoj,
    20.4. prizorgi la membrojn, precipe novajn,

XI. Aldono OG (ORGANIGRAMO)



Membrokategorioj de IFEF				
Asociaj Membroj de la landaj asocioj	Individuaj Membroj	Honoraj Membroj	Honoraj Prezidantoj	Membroj de la Honora Patrona Komitato

Asocioj, kun kiuj IFEF havas kunlaborajn rilatojn		
UEA IFEF estas Aliĝinta Asocio de la Universala Esperanto-Asocio	FISAIC Plejmultaj IFEF-landaj asocioj estas membroj de la Internacia Federacio de Kulturgflegantaj Fervojistoj	SAT IFEF estas subtenanta membro de la Sennacieca Asocio Tutmonda
IEM IFEF kunlaboras kun la Internacia Esperanto-Muzeo Vieno	UIC IFEF estas membro de la Projekto RailLexic pri fervojfakaj terminoj	TEC de UEA IFEF havas delegiton ĉe la Terminologia Esperanto-Centro

§ 5 Agadperiodoj

1) La administra jaro estas la kalendara jaro.
2) La organiza jaro komenciĝas tuj post la federacia kongreso.

§ 6 Lingvo

La oficiala lingvo de IFEF estas la internacia lingvo Esperanto laŭ la difinoj en sia Fundamento, laŭ la verkaro de Zamenhof kaj laŭ la ĝenerala lingvouzo kontrolita de la Akademio de Esperanto.

§ 7 Respondeco de la Federacio

Pri la agoj de siaj reprezentantoj IFEF respondecas nur en tia amplekso, ke tiuj agoj okazis laŭ la kompetentecoj, kiujn Statuto, Regularoj kaj kongresaj decidoj difinas por ĉiu funkcio.

II. MEMBRECO

§ 8 Membrokategorioj

La Federacio distingas jenajn membrojn:
1) asociaj membroj de la aliĝintaj landaj asocioj;
2) individuaj membroj el landoj, kie ne ekzistas landa asocio;
3) honoraj membroj, nomumitaj de la komitato pro siaj meritoj por la Federacio;
4) honoraj prezidantoj, nomumitaj de la komitato pro siaj meritoj por la Federacio.
5) membroj de la Honora Patrona Komitato.

Ĝenerala Regularo § 8:

Al 3) kaj al 4)
- a) Proponon por honoraj membrecoj rajtas fari la estraro aŭ almenaŭ kvin komitatanoj el pli ol du landaj asocioj. La kandidato devas esti IFEF-membro kaj havi eksterordinarajn meritojn por la Federacio.
- b) Al la propono oni aldonu mallongan priskribon pri la vivo kun la plej gravaj datoj, kaj pri la servoj faritaj por IFEF, kaj eventualan liston de laboraĵoj verkitaj en Esperanto.
- c) La komitato povas delegi al la estraro por la daŭro de tri jaroj la rajton elekti kandidaton por honora membreco interkonsente kun ties landa asocio. Havante delegon, se cirkonstancoj malfaciligas antaŭan aprobon, la estraro povas peti postan aprobon de la komitato.
- d) Por la plua traktado de la propono validas § 22 kaj § 23.
- e) Honoraj membroj kaj honoraj prezidantoj estas liberaj de kotizpago kaj laŭdezire ricevas la protokolojn de la nepublikaj komitatkunsidoj.

Al 3) La maksimuma nombro de vivantaj honoraj membroj ne transiru dekkvin.

Al 4) La kandidato devas esti estinta prezidanto minimume dum tri elektoperiodoj.

Al 5) La Honora Patrona Komitato estas speciala konstanta reprezenta organo de la Federacio, kiu konsistas el personoj elektitaj inter ministroj, altrangaj fervojaj funkciuloj kaj nefervojistaj eminentuloj pro siaj meritoj por IFEF. Proponon por la elekto rajtas fari la estraro aŭ la koncerna landa asocio, kiuj devas konfirmi kaj prezenti koncize la meritojn de la kandidato. Pri la akcepto de la propono, antaŭ la aprobo fare de la komitato, provizore decidas la estraro. La membroj, dumvivaj, de la Honora Patrona Komitato estas liberaj de kotizpago.

§ 9 Apogantoj

Apogantoj estas personoj aŭ organizoj, kiuj subtenas morale kaj finance la celojn de la Federacio. Ili ne estas membroj laŭ § 8.

Ĝenerala Regularo § 9:

La estraro decidas pri la akcepto kaj raportas al la komitato pri la financa kontribuaĵo de apogantoj.

§ 10 Aliĝkondiĉoj

1) La membroj de landa fervojista Esperanto-asocio, laŭregule organizitaj, povas aliĝi al la Federacio, kondiĉe ke la asocia statuto ne kontraŭas la IFEF-Statuton.
2) El ĉiu lando (ŝtato) principe povas esti reprezentata nur unu landa asocio. Se pro naciaj cirkonstancoj ne eblas starigi tutŝtatan asocion, IFEF akceptas plurajn sekciojn el la tereno de la respektiva ŝtato. Pri la rajtoj je komitatanoj kaj voĉdonado validas la sumo de la sekciaj IFEF-membroj (§ 12). La sekcioj decidas inter si pri la personoj de komitatanoj.
3) La membreco de landa asocio efektiviĝas post la akcepto fare de la komitato kaj post la pago de la kotizoj.
4) Nur kiu loĝas en lando, kie ne ekzistas aliĝinta asocio, senpere aniĝas al IFEF kiel individua membro. La membrecon de individua membro ordigas kaj registras la kasisto.

Ĝenerala Regularo § 10:

Al 1) La minimuma nombro da membroj por aliĝo kiel landa asocio sen komitatano estas dek.

Al 3) a) La baza jarkotizo por la kuranta jaro estas pagenda al IFEF de la landaj asocioj kaj de individuaj membroj ĝis la 30a de junio.

b) Ĉiujare en la kongreso, plej malfrue ĝis la 30a de junio, la komitato konfirmas la kotizon por la venonta administra jaro, aŭ nove fiksas ĝin per kongrespropono kaze de intencota ŝanĝo. La kotizo inkluzivas la abonon al la IFEF-organo.

X. Aldono TL (TABELO PRI LIMDATOJ)

Kiam	Kiu agas	Al kiu anoncas	Pri kio	Rilate
post ĉiu IFEF-kongreso	IFEF-sekretario	ĝenerala sekretario de FISAIC	IFK venonta(j)	§ 4 2) c)
30a jun. antaŭ venonta administra jaro	komitato	estraro	jarkotizo (konfirmo aŭ ŝanĝo)	§ 10 3)
30a jun. kuranta administra jaro	landa asocio, individua membro	IFEF-kasisto	jarkotizo (pago)	§ 10 3)
31a aŭg. antaŭ fino de ofic-periodo	estraranoj kaj gvidanto de faka komisiono	ĉefkomitatano	demisio	§ 14 1) d)
31a aŭg. antaŭ kongresjaro	komisionano de gastigonta kongreslando	sekretario de fake aplika sekcio	temo pri la ĉefa fakpralego	FR 10) a)
30a sep. antaŭ kongresjaro	sakretario de fake aplika sekcio	komisionano de kongreslando	gvidlinioj por ĉefa fakprelego	FR 10) a)
31a okt. antaŭ fino de ofic-periodo	sekratarioj kaj redaktoro de faka komisiono	ĉefkomitatano	demisio	FR 13)
31a dec. jaro da estrarelekto	landa asocio	ĉefkomitatano	delego de komitatano(j)	§ 12 1)
31a dec. jaro da estrarelekto	membroj	ĉefkomitatano	elekto da kromkomitatano	§ 12 2)
31a dec. jaro antaŭ estrar-elekto	kasisto landa asocio	ĉefkomitatano	elekto de revizoroj	§ 28 1)
31a dec. jaro antaŭ estrar-elekto	landa asocio	ĉefkomitatano	aprobo aŭ rifuzo al estrarkanditato	§ 18 d)
31a dec. jaro antaŭ estrar-elekto	kandidato por estraro	ĉefkomitatano	deklaro pri preteco	§ 18 e)
31a dec. antaŭ kongresjaro	membroj	ĉefkomitatano	proponoj por komitat-kunsidoj	§ 22 2)
31a dec. antaŭ kongresjaro	LKK	estraro	budĝeto	KR 18)
31a dec. jaro post estrar-elekto	landa asocio	sekretario de fake aplika sekcio	ŝanĝoj koncerne komisionanojn	FR 5)
31a dec. jaro post estrar-elekto	landa asocio	sekretario de termi-nara sekcio	ŝanĝoj koncerne komisionanojn	FR 5)
31a dec. antaŭ kongresjaro	gvidanto de faka komisiono	ĉefkomitatano	tagordoj de komisionaj kunsidoj	FR 7)
5 monatojn antaŭ IFK	LKK	kongresanoj	baza kongreskotizo	KR 15)
unua komitatkunsido de jaro antaŭ estrarelekto	komitato	--	elekto de ĉefkomitatano kaj anstataŭanto	§ 12 4)
komitatkunsido de jaro kun triobla nombro	komitato	--	elekto de estraranoj	§ 18 a)
komitatkunsido de jaro de estrarelekto	komitato	--	elekto de revizoroj	§ 28 1)
komisiona kunsido de jaro antaŭ estrarelekto	faka komisiono	--	elekto de gvidanto, sekretarioj kaj redaktoro de faka komisiono	FR 6)
6 monatojn post IFK de kongresjaro	LKK	estraro	kongresa bilanco	KR 19)
1 monaton post limdato de skriba voĉdonado	ĉefkomitatano	komitato, estraro	rezulto de la voĉdonado	§ 23 3)

d) La gastigonta LKK elektu kiel prelegonton kompetentan fakulon, kiu havu senriproĉan prononcon.
e) LKK disponigu en la kongreso sufiĉe da kompletaj tekstoj de la ĉefa fakprelego, depende de la nombro de kongresanoj, kaj rezervon, por kontentigi postajn mendojn. Krome LKK preparu resumojn por estraranoj, komitatanoj kaj redaktoroj.
f) Interkonsente kun landaj asocioj la sekretario aranĝas koncizajn prelegojn, kies titoloj kaj resumetoj laŭeble aperu en la kongreslibro. Krome povas esti aranĝataj "Fervojaj Aktualaĵoj", kiuj estu lastmomentaj informoj.
g) La fake aplika sekcio kolektas en aparta listo indikojn pri kaj fake kaj lingvaj altnivelaj prelegoj kaj artikoloj surbaze de la tabelo en la "Historio de IFEF" (1984) kaj daŭre kompletigas ĝin. IFEF aperigu la aktualan liston en ĉiu jaro dividebla per kvin.

F. Fakprelegoj ekster federaciaj kongresoj

11) Prelegoj en Universalaj Kongresoj (UK).
    a) Taskoj de IFEF-sekretario:
        1) administra preparado (mendo de salono por kontaktkunveno de fervojistaj kongresanoj);
        2) informi IFEF-komitatanon "A" de UEA.
    b) Taskoj de komitatano "A":
        1) laŭeble fiksi la temon kaj aranĝi la preparon de la prelego interkonsente kun IFEF-asocio, se UK okazas en lando kun tia asocio;
        2) informi IFEF-sekretarion kiel eble plej frue pri la prepare-voluo;
        3 tuj post la prelego, havigi la kompletan kaj resumitan tekstojn al la sekcia sekretario, kiu zorgu laŭeble por publikigo de la resumo en la IFEF-organo.
12) Prelegoj dum aliaj renkontiĝoj:
    IFEF informu la koncernan preleganton pri sia fake aplika agado kaj petu lin, adaptiĝi al tiu ĉi Regularo.

G. Demisioj

13) Intencota demisio de unu el la personoj sub cif. 3) b), c), d) estu anoncata al la ĉefkomitatano ĝis la 31a de oktobro antaŭ fino de oficperiodo.

*****

§ 11 Eksigo kaj eksigo

1) La membreco finiĝas per morto, skriba eksiĝdeklaro aŭ eksigo.
2) Membro, kiu komunikas sian eksiĝdeklaron post la fino de administra jaro, devas pagi la kotizon ankaŭ por la komenciĝinta jaro.
3) Membro estas eksigata pro:
    a) agado kontraŭ la celoj de IFEF;
    b) neplenumado de propraj devoj;
    c) endanĝerigo de la reputacio de IFEF aŭ de la Esperanto-movado;
    d) nepago de IFEF-kotizo malgraŭ perletera urĝigo.

Ĝenerala Regularo § 11:

Al 2) Eksiĝdeklaro estu direktata al la sekretario.
Al 3) La komitato devas esplori la situacion, se membro ne pagas la federacian kotizon dum pli ol du jaroj. Tio validas analoge por landaj asocioj.

III. KOMITATO

§ 12 Konsisto kaj elektoj

1) La komitato estas la decida organo de IFEF. Ĝi konsistas el komitatanoj, delegitaj de propraj landaj asocioj por ilin reprezenti.
2) Se necesas reprezenti apartan komisionon, la komitato povas alelekti kromkomitatanojn ĝis maksimume kvinono de la nombro de komitatanoj.
3) La gvidanto de la faka komisiono aŭtomate estas kromkomitatano.
4) La komitatanoj elektas inter si ĉefkomitatanon kaj anstataŭanton.

Ĝenerala Regularo § 12:

Al 1) kaj 2)
    a) Komitatanoj kaj kromkomitatanoj devas esti aktivaj, emeritaj aŭ estintaj fervojistoj aŭ personoj el asimilitaj entreprenoj. Ili devas esti IFEF-membroj kaj pretaj konservi la oficon dum tuta trijara laborperiodo.
    b) Por la plia proceduro validas § 22 kaj § 23.
Al 1) a) La minimuma nombro de asociaj membroj rajtiganta havi komitatanon, estas dekkvin. Landa asocio kun 15 ĝis 100 membroj delegas unu komitatanon kaj unu plian por ĉiu komencita cent, maksimume ses komitatanojn.
    b) Pri la membronombro decidas la kotizpagoj al IFEF ĝis la fino de administra jaro, esceptokaze kaj pruvende ĝis antaŭ la komenco de la koncerna kunsido.
    c) La landaj asocioj komunikas al la ĉefkomitatano antaŭ la fino de jaroj de estrarelekto la nomojn kaj adresojn de siaj delegotaj komitatanoj por la venonta organiza oficperiodo.
Al 2) La elekto de kromkomitatanoj okazas en jaro post estrarelekto. Proponojn rajtas fari la membraro laŭ § 22. Reelekto eblas.

Al 4) a) La elekto de la ĉefkomitatano kaj de la anstataŭanto okazas en jaro antaŭ estrarelekto en la unua komitatkunsido. Proponojn rajtas fari nur la funkciantaj komitatanoj. Reelekto eblas.
b) La kandidatoj devas esti estintaj komitatanoj dum minimume unu elektoperiodo.

§ 13 Taskoj de la komitato

1) La komitato estas kompetenta pri:
   a) aprobo de la Statuto kaj Regularoj;
   b) direkto de la ĝenerala agado de la Federacio;
   c) aliĝo kaj eksigo de ĉiuspecaj membroj;
   d) elektoj de la estraro, ĉefkomitatano kaj anstataŭanto, kromkomitatanoj;
   e) decidoj por la agado de la estraro;
   f) starigo de komisionoj, konfirmo de ties respondeculoj kaj elekto de komisiitoj por specialaj taskoj;
   g) aprobo de la estraraj jarraportoj;
   h) aprobo de la budĝeto, fikso de la jarkotizo kaj ekzamenado de la financoj;
   i) nomumo de honoraj prezidantoj, honoraj membroj kaj membroj de la Honora Patrona Komitato;
   k) kunlaboro kun aliaj esperantistaj, kulturaj kaj sindikataj organizoj en la limoj de neŭtraleco;
   l) proponoj flanke de la membraro laŭ § 22;
   m) akcepto de proponoj prezentitaj post limtempo;
   n) lokoj kaj periodoj de la sekvontaj kongresoj.
2) Pri la interna organizado kaj disvolviĝo de landaj asocioj kaj pri ties rilatoj kun ŝtataj aŭ fervojaj instancoj la komitato povas esprimi nur rekomendojn.

Ĝenerala Regularo§ 13:

Al 1) b) Komitatano aŭ kromkomitatano rajtas komuniki sciigojn kaj peti opiniojn de la komitato pere de aparta cirkulero.

§ 14 Taskoj de la ĉefkomitatano

1) La ĉefkomitatano:
   a) prizorgas la administrajn taskojn de la komitato;
   b) invitas la komitaton al kunsidoj kaj al skribaj voĉdonoj interkonsente kun la estraro;
   c) akceptas proponojn kaj submetas ilin al la komitato;
   d) ricevas demisiojn de estraranoj kaj gvidanto de la faka komisio-

   b) po unu komisionano kompetenta pri la respektivaj prelegoj en la gastiganta kaj gastigonta landoj, kiuj funkcias de kongreso al kongreso.
5) Antaŭ la 31a de decembro de jaroj post estrarelekto la landaj asocioj komunikas eventualajn ŝanĝojn pri la nomo kaj adreso de sia (j) kunlaboranta(j) komisionano(j) al la sekcia(j) sekretario(j). Li (ili) informu la gvidanton antaŭ fino de januaro.

D. Elektoj

6) La komisiono elektas inter si la gvidanton, la sekretariojn kaj la redaktoron de TeKu. Tiu elekto okazas en la jaroj antaŭ la jaro de estrarelekto komence de la unua komisiona kunsido. Ĝi validas por tri organizaj jaroj. Reelekto eblas. La elektoj validas nur post konfirmo de la komitato.

E. Labormetodo

7) La programo de IFEF-kongresoj enhavu minimume unu fakan prelegon, referaĵeto(j)n "Fervojaj Aktualaĵoj" kaj kunsidojn de ambaŭ sekcioj de la faka komisiono. Por tiuj kunsidoj la gvidanto, interkonsente kun la sekretarioj, sendas la tagordojn ĝis 31a de decembro al la ĉefkomitatano.
8) La kunsidojn prezidas la gvidanto aŭ, se malhelpita, de li nomumita anstataŭanto.
9) La terminara sekcio agu laŭ sistemo, kiu garantias la plej efikajn rezultojn kaj oni konsideru la disponeblajn rimedojn kaj la laborfortojn.
10) La fake aplika sekcio agu laŭ jena labormetodo:
   a) Jam dum la aktuala kongreso la sekretario interkonsentu kun la kompetenta respondeculo de la venonta kongreso pri la antaŭvidebla fakprelega temo. Ĝi, laŭeble, koncernu ĝenerale interesan problemon de la gastigonta lando. Se temo ne jam estas elektebla, la estonta LKK anoncu ĝin ĝis plej malfrue la 31a de aŭgusto al la sekretario. Tiu sendos, se necese, helpajn gvidliniojn ĝis la fino de septembro.
   b) La ĉefa fakprelego estu originale verkita, aŭ ĝi prezentu la opinion de eminentuloj de la koncema lando.
   c) Por atingi laŭterminaran ĝustecon, la respondeculo por la fakprelego prezentu la manuskripton ĝis plej malfrue kvar monatoj antaŭ la kongreso al la sekretario de la sekcio, kiu, se konvene, submetas ĝin al la terminara sekcio.

IX. Aldono FR (REGULARO FAKA KOMISIONO)

A. Ĝeneralaĵoj

1) Tiu ĉi regularo validas por la laboro de la "Faka Komisiono". Ĝia agado estu konforma al la IFEF-statuto.

B. Taskoj

2) La Faka Komisiono havas jenajn taskojn:
   a) kompili kaj ĝisdatigi la fervojfakan terminaron kaj fari ĝin utilige-bla en konvena maniero;
   b) doni konsilojn pri fervojaj terminoj, kiam petitaj;
   c) stimuli la pliriĉigon de fervojfaka literaturo, ekzemple la tradukon de konvencioj aŭ la verkadon de fakaj artikoloj kaj ties eldonon kaj tiel profesie klerigi la membrojn de IFEF;
   d) kunlabori kun terminologiaj centroj kaj institucioj;
   e) subteni la aranĝadon de fakaj prelegoj kaj referaĵetoj "Fervojaj Aktualaĵoj" laŭ kongresa regularo sur plejeble alta nivelo;
   f) laŭ peto helpi en fakprelegoj okaze de aliaj renkontiĝoj;
   g) prezenti la taŭgecon de la Internacia Lingvo por la traktado de fakaj temoj;
   h) eldoni laŭbezone internacian komunikilon "Terminara Kuriero" (TeKu) kaj kolektaĵon de fakaj artikoloj "Fervojfakaj Kajeroj".

C. Konsisto

3) La faka komisiono konsistas el du sekcioj, nome la "Terminara Sekcio" kaj la "Fake Aplika Sekcio".

   La faka komisiono estas gvidata de:
   a) gvidanto, kiu ĝin reprezentas kaj donas la direktivojn;
   b) sekretario de la terminara sekcio;
   c) sekretario de la fake aplika sekcio;
   d) redaktoro de terminara kuriero.

4) Al la komisiono apartenas:
   a) unu aŭ pluraj komisionanoj el ĉiu landa asocio. Ili formas konsilantaron, kiu funkcias dum tri administraj jaroj. Pro la diversfakaj taskoj de la komisiono la komisionanoj rajtas elekti, ĉu ili intencas kunlabori en la terminara aŭ en la fake aplika aŭ en ambaŭ sekcioj. Ili skribe deklaru tion al la gvidanto kaj krome sian pretecon konservi la oficon dum kompleta periodo. La gvidanto informu la redaktoron de TeKu, kiu publikigas nomojn, adresojn kaj elektitajn taskojn;

   no, konigas ilin al la landaj asocioj kaj komitatanoj kaj invitas prezenti kandidatojn;
   e) gvidas la Federacion ĝis la sekvonta komitatkunsido kaze de evidenta malfunkciado de la estraro.
2) La ĉefkomitatano kaj anstataŭanto konservas la reprezentantecon de siaj landoj kaj ne ĝuas apartajn rajtojn.

Ĝenerala Regularo § 14:

Al 1) d) Intencota demisio de estrarano aŭ de la komisiona gvidanto devas esti anoncataj al la ĉefkomitatano ĝis la 31a de aŭgusto antaŭ la fino de oficperiodo.

§ 15 Anstataŭado

1) Landa asocio, landa sekcio aŭ komisiono rajtas skribe delegi por difinita komitatkunsido samrajtan anstataŭanton por komitatano aŭ kromkomitatano malhelpata partopreni en tiu kunsido.
2) Landa asocio, landa sekcio aŭ komisiono, kiu povas delegi nek komitatanon, nek anstataŭanton al komitatkunsido, rajtas skribe voĉdoni pri raportoj kaj publikigitaj proponoj, kaj, se ĝi mem faris proponojn por la kongresa tagordo, ĝi rajtas peti alian landan asocion aŭ la estraron defendi ilin.
3) Anstataŭigo por skriba voĉdonado ne eblas.

Ĝenerala Regularo § 15:

Al 1) Se ĉeestanta komitatano, pro grava kaŭzo, parte aŭ tute ne povas partopreni en dumkongresa komitatkunsido, li rajtas skribe transdoni sian voĉdonrajton por tiu okazo kaj tempo al alia membro de sia landa asocio aŭ komisiono. La anstataŭanto devas prezenti la rajtigilon al la kunsida prezidanto.

Al 2) Landa asocio (komisiono), ne reprezentata en kongreso, sendu siajn skribajn decidojn pri raportoj kaj kongresproponoj en fermita letero, kun mencio "voĉdonado', al la IFEF-sekretario, kiu transdonos ĝin al la gvidanto de la kongreskunsidoj, kiu sola rajtas malfermi ĝin dum la respektiva kunsido.

Al 3) Dum kongresoj tamen validas § 15 kaj al 1).

§ 16 Respondeco de la komitatanoj

1) Komitatano aŭ kromkomitatano prezentas kaj defendas proponojn kaj decidojn de sia landa asocio, sekcio aŭ komisiono, tamen li estas persone respondeca pri siaj agoj kaj decidoj. Li devas plenumi la decidojn de la komitato, eĉ se li ne samopinias.
2) Kaze ke landa asocio, sekcio aŭ komisiono malaprobas la agadon de sia komitatano, ĝi povas forigi lin de la posteno antaŭ fino de oficperiodo, sed devas tuj anstataŭigi lin, kaj anonci tion al la ĉefkomitatano.

IV. ESTRARO

§ 17 Konsisto

La estraro de la Federacio konsistas el prezidanto, vicprezidanto, sekretario, kasisto kaj redaktoro.

Ĝenerala Regularo § 17:

En konvenaj kazoj, por akcenti la reputacion de IFEF, la estraranoj povas nomi sin en eksterfederaciaj rilatoj "Ĝenerala Prezidanto" ktp.

§ 18 Elektoj

La estraranoj estas elektataj de la komitato.

Ĝenerala Regularo § 18:

a) Elekto de estraranoj por trijara oficperiodo okazas en jaroj kun nombro dividebla per tri. Reelekto eblas.
b) Estrarano, kiu kandidatiĝas por alia estrarofico, laŭdezire restas kandidato ankaŭ por reelekto en sia antaŭa ofico.
c) Proponojn povas fari la membroj laŭ § 22. Ili enhavu gravajn koncizajn indikojn pri la kandidatoj, minimume kiel:
   1) aĝon;
   2) deĵoroficon;
   3) agadon por Esperanto (speciale por IFEF kaj propra landa asocio);
   4) fotografaĵon.
d) Necesas skriba aprobo de la interesita landa asocio (aŭ eventuala motivita rifuzo), kiu devas atingi ĉefkomitatanon ĝis 31.12.
e) La kandidato(j) devas esti aktiva(j) aŭ emerita(j) fervojisto(j) kaj havu spertojn en la federacia laboro. Ili havigu al la ĉefkomitatano, plej malfrue ĝis 31.12 antaŭ elektojaro, deklaron pri sia preteco partopreni en la kunsidoj de estraro kaj komitato dum la koncerna oficperiodo.
f) La ĉefkomitatano publikigu la proponojn, indikojn kaj fotografaĵojn en la IFEF-organo kiel kongresproponojn.
g) La elektoproceduro okazas laŭ § 23. La ĉefkomitatano kaj tri diverslandaj helpantoj elektitaj de la komitato formas elekto-komisionon, kiu aranĝas sekretan elekton kaj konfirmas publike la rezulton en la sama kunsido. Ankaŭ se estas nur unu kandidato, necesas konstati la nombron de la voĉoj.
h) La kandidatoj ne rajtas ĉeesti la elektoproceduron, sed devas havi eblecon voĉdoni, se ili voĉdonrajtas.
i) Elektita estas tiu kandidato, kiu ricevas la plej multajn voĉojn. Kaze de voĉegaleco oni revoĉdonu. Se estas sama rezulto, decidas la loto.
k) La oficperiodo de novelektita estrarano komenciĝas tuj post valida elekto.

§ 19 Taskoj de la estraro

1) La estraro respondecas al la komitato kaj devas fari ĉion utilan kaj eblan por la Federacio, nome precipe:
   a) plenumi la decidojn de la komitato;

   repagebla al la aliĝinto, kiu tamen ricevu la kongresmaterialon.
14) LKK, interkonsente kun la estraro, fiksas la bazan kongreskotizon por IFEF-membroj, kiu validas ĝis kvin monatoj antaŭ la kongreso. Post tiu dato LKK rajtas plialtigi ĝin. Familianoj kaj junuloj aĝaj malpli ol dudek jaroj pagas la duonon.
15) Senpagajn kongreskartojn ricevas estraranoj, ĉefkomitatano, honoraj prezidantoj, honoraj membroj, membroj de la Honora Patrona Komitato, la gvidanto, sekretarioj kaj redaktoro de la faka komisiono kaj la LKK-anoj.
16) LKK pagu la tranoktadkostojn por kvin tagoj por estraranoj, ĉefkomitatano, gvidanto, sekretarioj kaj redaktoro de la faka komisiono.
17) Antaŭ la 31a de decembro LKK prezentas budĝeton al la estraro surbaze de meza nombro de atendotaj kongresanoj. Tiel longe, kiel tiu meza aliĝnombro ne estas superita, LKK rigore respektu la sumojn indikitajn sub "elspezoj".
18) Plej malfrue ses monatojn post la kongreso LKK devas prezenti al la estraro kompletan reviziitan bilancon. Antaŭ la finkalkulo kaj fikso de eventuala profito povas esti subtrahitaj la financaj rimedoj, kiuj estis donitaj de fervojaj instancoj, sindikatoj, ktp, aŭ kiuj devenas de fondusoj.
19) Kaze de deficito LKK respondecas pri la likvido de ĉiuj ŝuldoj.
20) Kaze de profito du trionoj el la sumo restas je dispono de LKK. La reston LKK sendas al la Kongresa Garantia Fonduso.
21) La kongresa garantia fonduso estas administrata de la IFEF-kasisto. El ĝi la estraro rajtas tute aŭ parte kovri deficitojn de kongresoj, kondiĉe ke la koncerna LKK restis en la kadro de sia budĝeto kaj atentis la Kongresan Regularon same kiel eventualajn skribajn konsilojn de la estraro.

*****

g) LKK funkciigu informservon, kiu antaŭ kaj dum la kongreso provizu per taŭga materialo la publikajn kaj fakajn komunikilojn, la kongreslokajn fervojistojn, same kiel la kongresanaron;
h) LKK senpage disponigu taŭgajn salonojn por ĉiuj kunsidoj (de estraro, komitato, komisionoj, fakprelegoj, ktp) oficiale starigitaj de IFEF, laŭ la programo kaj tagordoj.

6) Ĉiuj oficialaj leteroj alvenintaj por la kongreso estas kongresa propraĵo. Oni devas transdoni ilin al la IFEF-sekretario.

C. Kongresanoj

7) La kongreson rajtas partopreni:
a) IFEF-membroj;
b) iliaj familianoj;
c) aliaj esperantistoj;
d) interesitaj neesperantistoj.

8) Por publikigi la adresojn de la kongresanoj, necesas la antaŭa konsento de la estraro.

D. Oficiala programo

9) La kongresprogramo pretigita de LKK bezonas la aprobon de la estraro.

10) Kutimaj aranĝoj de la kongreso estas:
a) inaŭguro (solena malfermo);
b) estraraj, komitataj kaj komisionaj kunsidoj;
c) faka(j) prelego(j), fervojaj aktualaĵoj kaj laŭeble vizito de fervojaj instalaĵoj;
d) kultur-artaj, folkloraj kaj turismaj aranĝoj;
e) ferma kunveno.

11) Kaze ke la prezidanto kaj la vicprezidanto estas malhelpataj, la komitato nomumas prezidantojn por la unuopaj kunsidoj.

12) Komisiongvidantoj kaj komisiitoj raportas dum la plenkunsido. Ili rajtas fari nur rekomendojn al la komitato, kiu estas libera pridecidi ilin.

E. Financoj

13) Por kovri la organizajn elspezojn, LKK postulas kongreskotizon pagendan ĉe la aliĝo. Post ĉiu enorda aliĝo oni sendu kongreskarton, sur kiu estu indikitaj minimume kongresnumero kaj nomo de la aliĝinto. Kongreskarto kaj kongreskotizo ne estas transigeblaj al alia persono. Kaze de nepartopreno la kongreskotizo ne estas

b) prezenti proponojn;
c) prezenti agad- kaj kas-raportojn de la pasinta, kaj budĝeton por la sekvonta jaroj;
d) respondeci pri la financoj;
e) administri la propraĵon;
f) aprobi kongresprogramon kaj kunlabori kun la loka kongresa komitato kaj la koncerna landa asocio;
g) kunvoki la komitaton helpe de la ĉefkomitatano minimume du monatojn antaŭ kunsido kaj informi ĝin pri la tagordo kaj proponoj;
h) eldoni la federacian organon;
i) starigi kaj aktualigi laborplanon.

§ 20 Funkcioj de la estraranoj

1) La prezidanto:
a) reprezentas la Federacion;
b) prezidas la estraron, komitaton kaj kongreson;
c) subskribas la ĉefajn korespondaĵojn kaj dokumentojn;
d) afergvidas la organizadon de la kongresoj;
e) pro urĝaj kaj esceptaj kazoj rajtas agi anstataŭante estraron kaj komitaton, sed havigu al si la konsenton de la komitato kiel eble plej baldaŭ.

2) La vicprezidanto:
a) anstataŭas la prezidanton, laŭnecese;
b) kolektas la jarraportojn de la landaj asocioj kaj verkas ties resumon por plenkunsido kaj IFEF-organo;
c) transprenas specialajn taskojn laŭ interkonsento kun la prezidanto.

3) La sekretario:
a) administras la Federacion;
b) memstare plenumas malpli gravajn korespondaĵojn, sciigante ilian enhavon, originale aŭ kopie, al la prezidanto;
c) respondecas pri la plenumo de la kurantaj laboroj kaj certigas la ligon kun internaciaj organizoj kaj fervojaj instancoj;
d) interkonsente kun la prezidanto kaj ĉefkomitatano fiksas la tagordon de la komitatkunsidoj kaj prizorgas ties protokoladon;
e) plenumas la decidojn de la komitato, se ili ne koncernas aliajn estraranojn;
f) administras la arkivon.

4) La kasisto:
zorgas pri ĉiuj kasaj kaj bilancaj aferoj, akurata librotenado kaj respekto de la budĝeto.

5) La redaktoro:
prizorgas la eldonadon de la federacia organo en la kadro de la disponeblaj financaj rimedoj kaj konforme al la celoj de la Federacio.

Ĝenerala Regularo § 20:

Al 3) d) La sekretario zorgu, ke la komitat- kaj plenkunsidoj laŭeble estu kasede registritaj. Post la kongreso la protokoltekstoj de la komitatkunsidoj estu kiel eble plej rapide sendataj rekte al la estraranoj kaj komitatanoj (komparu § 26 Ĝen. Reg. 2) d)).

V. LABORMANIERO

§ 21 Kunsidoj

1) Komitatlaboroj:
   a) La komitato kunvenas okaze de la federacia kongreso kaj eventuale inter du kongresoj en urĝaj kazoj.
   b) Dum la kongreso okazas:
      b.1) minimume unu nepublika komitatkunsido, en kiu rajtas partopreni estraranoj, komitatanoj kaj kromkomitatanoj, honoraj prezidantoj, honoraj membroj kaj ne pli ol unu observanto el ĉiu landa asocio. Honoraj membroj, honoraj prezidantoj kaj observantoj rajtas diskuti, sed ne voĉdoni;
      b.2) unu publika (kutime en du partoj) plenkunsido, en kiu ĉiuj IFEF-anoj rajtas diskuti, sed voĉdoni rajtas nur la komitatanoj, kromkomitatanoj aŭ anstataŭantoj;
      b.3) pliaj kunsidoj, kiuj antaŭe estas deklaritaj publikaj aŭ nepublikaj.
   c) La komitato krome funkcias skribe dum la tuta jaro pere de la ĉefkomitatano.
2) Estrarlaboroj:
   La estraro, krom en la kongreso, kunvenas almenaŭ dufoje jare.
3) Komisionlaboroj:
   La IFEF-komisionoj kunvenas plurfoje en kunsidoj kutime publikaj.

Ĝenerala Regularo § 21:

Al 1 a) Al komitatkunsidoj povas esti invitata(j) komisiito(j) por specialaj taskoj, se la tagordo postulas trakti ties taskojn.
b) La gvidanto de komitatkunsidoj komence devas kontroli la voĉdonrajton de la ĉeestantoj.

VIII. Aldono KR (KONGRESA REGULARO)

A. Ĝeneralaĵoj

1) Tiu ĉi regularo validas por:
   a) internaciaj kongresoj organizataj de landaj asocioj, interkonsente kun la Federacio;
   b) internaciaj kongresoj organizataj de IFEF, interkonsente kun landaj asocioj aŭ aliaj Esperanto-asocioj.
   c) Por aliaj internaciaj renkontiĝoj validas apartaj interkonsentoj inter IFEF kaj la organizantoj.
2) Kutime okazas unu kongreso ĉiun jaron, laŭeble en majo.
3) La kongreso devas konformiĝi al § 2 kaj § 3. Se la organizantoj ne povas garantii la neŭtralecon, la estraro rajtas deklari kiel kongreson nur parton de la aranĝoj.

B. Organizado

4) Kutime landa asocio invitas kongreson. Laŭeble tri, sed minimume du jarojn antaŭ la kongreso, la komitato provizore devas elekti la kongreslandon. Plej malfrue unu jaron antaŭ la kongreso la komitato devas konfirmi tiun elekton kaj samtempe la gastigonta lando konatigu ankaŭ la kongreslokon.
5) La gastigonta landa asocio elektas Lokan Kongresan Komitaton (LKK), kiu aranĝas la kongreson laŭ jenaj ĝeneralaj indikoj:
   a) LKK-anoj skribe devas akcepti la enhavon de tiu ĉi Kongresa Regularo;
   b) LKK konsistu minimume el prezidanto, sekretario kaj kasisto kaj laŭbezone oni povas elekti helpantojn por apartaj taskoj;
   c) oni elektu revizorojn por kontrolo de bilanco kaj librotenado laŭ la reglamentoj de la respektiva lando;
   d) LKK starigu provizoran kongresprogramon;
   e) LKK kreu specialan kongresemblemon, kiu laŭeble aperu sur ĉiaj eldonaĵoj preparitaj en konekso kun la kongreso;
   f) LKK pretigu konvenan kongresmaterialon, minimume nome:
      1) kongresinsignon;
      2) kongreslibron, kiu minimume enhavu:
         a) la oficialan programon,
         b) la tagordojn de ĉiuj kunsidoj,
         c) la temo(j)n de la kongresa(j) fakprelego(j),
         d) laŭeble kaj rekomendinde, ĉiujn priskribojn de fakaj, kulturaj, artaj kaj turismaj aranĝoj.

mitato. La plenkunsido aprobis ilin dum la 41a IFEF-kongreso en Salou la 17.05.1989.

2) Tiuj ĉi Statuto kun Ĝenerala Regularo kaj Aldonoj KR kaj TL validas ekde la 1a de januaro 1990 por ĉiuj IFEF-membroj. [Ili anstataŭas la Statuton/Regularojn de 01.01.1973].

*****

§ 22 Rajtoj de la membraro

1) Proponojn por la tagordo de la sekvonta kongreso rajtas direkti al la ĉefkomitatano:
   a) estraranoj, komitatanoj kaj individuaj membroj;
   b) landaj asocioj kaj ties membroj pere de siaj komitatanoj.
2) La proponoj devas atingi la ĉefkomitatanon plej malfrue la 31an de decembro por esti pritraktataj en la komitatkunsidoj de la sekvonta kongreso.
3) En la publikaj kunsidoj ĉiuj membroj rajtas diskuti pri la punktoj de la tagordo.
4) Sub la punkto "Libera diskutado" ĉiuj membroj rajtas organizi debaton pri aferoj koncernantaj IFEF, kies konkludoj tamen ne devigas la Federacion je certa faro.

Ĝenerala Regularo § 22:

Al 2) Proponinto, kiu prezentas proponon post la limtempo, devas pruvi, ke antaŭ la fiksita dato ne eblis prezenti ĝin. La komitato decidas ĉu trakti tian proponon.

Al 3) Tamen la kunsido-prezidanto povas limigi la paroltempon de la intervenantoj.

§ 23 Voĉdonado

1) Por decidoj validas la plimulto de la "por" kaj de la "kontraŭ" esprimitaj voĉoj.
2) Decidojn en kunvenoj, en kiuj partoprenas en voĉdonado malpli ol la duono de la voĉdonrajtaj komitatanoj aŭ de la estraro, oni submetu al plia voĉdono en alia kunveno, en kiu sufiĉos la plimulto de la "por" kaj de la "kontraŭ" esprimitaj voĉoj.
3) Proponoj skribe senditaj de la ĉefkomitatano al la komitatanoj povas esti decidaj nur, kiam pli ol la duono de la voĉdonrajtaj komitatanoj partoprenas la voĉdonon.
4) Kaze de voĉegaleco oni konsideru proponon kiel malakceptitan.
5) Por ŝanĝi la Statuton - ne la Regularojn - aŭ por likvidi la Federacion necesas, ke du trionoj de ĉiuj voĉdonrajtaj komitatanoj partoprenas en voĉdonado kaj ke du trionoj de la esprimitaj voĉoj estas "por".
6) Pri personoj oni voĉdonu en kunsidoj sekrete kaj skribe.

Ĝenerala Regularo § 23:

Al 1) Pri proponoj oni decidu laŭ la originala teksto, tamen amendon oni akceptu, kiam evidentiĝas, ke al IFEF konvenus pliboniga modifo sen ŝanĝi la sencon de la propono.

Al 3) Plej malfrue unu monaton post la limdato de skriba voĉdonado la ĉefkomitatano forsendas cirkuleron al la estraro kaj la komitatanoj pri la rezulto.

§ 24 Kompensoj

1) Por kovri administrajn kaj parte vojaĝajn elspezojn de estraranoj kaj ĉefkomitatano, la komitato povas asigni certan sumon en la budĝeto. La komitatanoj ne ricevas kompensojn de la Federacio.
2) La komitatano "A" por UEA povas ricevi vojaĝkompenson, kiam li partoprenas en Universala Kongreso, sed nur laŭbezone kaj maksimume ĝis la valoro de 100 svisaj frankoj.

VI. FINANCOJ, ORGANO, ARKIVO

§ 25 Financoj

1) La financoj de la Federacio konsistas el:
   a) la havaĵo (kapitalo, fondusoj, oficejaj objektoj);
   b) regulaj enspezoj (kotizoj, ktp);
   c) neregulaj enspezoj (subvencioj, donacoj, loterioj ktp).

Ĝenerala Regularo § 25:

La financa kompetenteco de la estraro por elspezoj ekster la budĝeto estas fiksita je svisaj frankoj:
a) 200 por sin ripetantaj elspezoj;
b) 800 por unufojaj elspezoj.

§ 26 Federacia organo

La Federacio eldonas oficialan organon. Ĝi estas redaktata laŭ la fundamentaj principoj de IFEF esprimitaj en § 2 kaj § 3 kaj laŭ "Ĝeneralaj Gvidlinioj" fiksitaj de la estraro. Ĝi aperas minimume sesfoje jare.

Ĝenerala Regularo § 26:

1)La titolo de la IFEF-organo estas "Internacia Fervojisto" (IF).
2)Dum jaro aperu i.a. en IFEF-organo:
a) en la numero unu: - aktuala listo de la honoritoj de la Federacio;
b) en antaŭkongresa numero: - eventualaj kongresaj proponoj;
c) en la unua postkongresa numero:
   c.1) raporto(j) pri la kongreso,
   c.2) resumo(j) de la fakprelego(j),
   c.3) tekstoj de "Fervojaj aktualaĵoj" laŭeble;
d) en la dua postkongresa numero:
   d.1) protokolo de la plenkunsido,
   d.2) resumo de la jarraportoj.

§ 27 Arkivo

1) Pri la arkivo respondecas la sekretario.

VII. DIVERSAĴOJ

§ 28 Revizio

1) La komitato elektas en la kongreso tri revizorojn kaj unu vicrevizoron.
2) Taskoj de la revizoroj:
   a) ekzameni la financojn kaj la librotenadon;
   b) konstati kiom da komitatanoj la landaj asocioj rajtas delegi laŭ siaj kotizoj pagitaj ĝis la fino de la pasinta administra jaro.

Ĝenerala Regularo § 28:

Al 1) Por trijara revizor-elekto okazas en estrar-elektojaro. Proponojn al la ĉefkomitatano ĝis 31.12 antaŭ elekto prefere faru la kasista landa asocio, kie ili laŭeble devas loĝi. Reelekto eblas nur post trijara paŭzo.

§ 29 Konfliktoj

1) Konfliktoj inter la membroj, landaj asocioj inter si aŭ kun la estraro aŭ komitato devas esti solvitaj interne de IFEF. Se konfliktantaj partioj ne sukcesas interkonsenti, konflikta komisiono prijuĝas kaj findecidas.
2) Tiu komisiono konsistas el tri personoj, po unu el la disputantaj partioj kaj tria, neŭtrala, ambaŭflanke akceptita, kiu prezidas. Se ne eblas interkonsento pri la tria persono, la estraro determinas la prezidanton.

§ 30 Likvido

1) Se necesas likvidi la Federacion, la komitato elektas komisionon, kiu ordigas la kurantajn aferojn kaj indikas la rimedojn por kovri eventualan deficiton.
2) Restanta havaĵo estu konservata dum dekkvin jaroj ĉe Esperanto- aŭ kultura organizo fiksita de la komisiono. Poste ĝi transiru al tiu organizo mem, se intertempe nova federacio ne fondiĝis.

§ 31 Duboj kaj demandoj

Pri ĉiuj duboj kaj demandoj, kiuj ne estas traktitaj en tiuj ĉi Statuto kaj Regularoj, decidas la komitato aparte.

§ 32 Aprobo kaj valido

1) Tiuj ĉi tekstoj de Statuto kaj Regularoj estis formulitaj laŭ la rekomendoj de la statutrevizia komisiono kaj ŝanĝoproponoj de la ko-